



Unum ovile et unus pastor.  
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.  
(JOH., X, 16.)

# ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

---

## GRAVEGA AVIZO.

---

Kiel Prezidanto de la tutmonda societo, la I. K. U. E., mi havas la devon averti ĉiujn Katolikajn Esperantistojn pri danĝero, kiun la nuna granda disvastiĝo de nia internacia lingvo neeviteble naskas.

Esperanto estas lingvo, kaj per lingvo oni povas skribi kaj presigi, ne nur bonajn, sed ankaŭ malbonajn verkojn. La Sankta Eklezio, kiel bonega Patrino, absolute malpermesas al siaj infanoj la legadon de malbonaj presaĵoj, sen speciala permeso. Tia permeso estas donata de la Ekleziaj Aŭtoritatoj nur kiam ĝi estas necesa, ĉu por ekzameni librojn k. t. p., ĉu por ilin rifuti.

Presaĵoj povas esti malbonaj je du vidpunktoj: ili povas esti kontraŭ la fido, aŭ kontraŭ la bonmoroj. La Katolikoj ne povas, sen peko, legi ĵurnalojn, librojn, k. t. p., kiuj atakas, aŭ insultas, la Katolikan religion aŭ ĝiajn ministrojn. Ni, bedaŭrinde jam rimarkis en kelkaj esperantistaj gazetoj tre malagrablajn kaj eĉ malpiajn paragrafojn, havantajn eĉ insultojn kontraŭ nia Altestimata kaj Amata Patro, Lia Papa Moŝto Pio X-a. Kelkfoje, sed dank' al Dio malofte,

ni legis artikolojn, romanojn, historietojn k. t. p., verkitajn esperante, kiuj, je la vidpunkto de la kristana ĉasteco, tute maltaŭgis. El tiaj faktoj ni devas konkludi, ke ni Katolikoj tute ne povas legi, kaj lasi inter la manoj de niaj infanoj, ĉiujn esperantistajn presaĵojn. Kiel por aliaj lingvoj, tiel tute same por Esperanto, la Katolikoj devas esti tre singardemaj. Bona regulo estas, neniam aĉeti ĉu ĵurnalon, ĉu libron, sen antaŭe peti la konsilon de lerta esperantisto, kiu estas samtempe fidela katoliko.

Precipe estas necese ĉiam memori la leĝon de la Sankta Eklezio, kiu devigas, kiel oni diras teologie: „*Sub grave*” neniam legi aŭ aĉeti aŭ eĉ reteni, nerajtigitajn tradukojn de la Sankta Skribo, alivorte de la Biblio. Bone notu, ke rajtigitaj tradukoj de la Biblio, ĉu de iuj ajn libroj de la Biblio, estas nur tiuj, kiuj, post ekzameno de la Ekleziaj Aŭtoritatoj, ricevis la „*Imprimatur*”, ĉu de la loka Episkopo, ĉu de Roma Kongregacio, rajtigita por ekzameni librojn de Lia Papa Moŝto. La kaŭzo de tiu granda singardemeco estas evidenta al ĉiu prudenta homo.

Laŭ la Katolika Kredo, la Sankta Skribo estas la inspirita parolo de Dio. Ĝi estas parto de la „*Depositum fidei*” donita de Dio al sia Sankta Eklezio por instrui per ĝi ĉiujn naciojn. Do, la Sankta Eklezio povas permesi la tradukon de tiuj Diaj Orakloj nur al bonkonataj, fidelaj, kaj kleraj Katolokoj, kaj plue, tiaj tradukoj devas esti akompanitaj de komentarioj kaj klarigoj pri malfacilaj tekstoj, laŭ la instruado de la Sankta Eklezio, al kiu *sole* apartenas la rajton, neerareble difini la *veran* signifon de la Sankta Skribo.

AUSTIN RICHARDSON,

Prezidanto de la I. K. U. E.

---

# Kelkaj Vortoj pri „Internaciaj Sciencaj Kongresoj de Katolikoj”.

---

Unu el la plej belaj aperoj de katolika internacia vivo dum la papado de Leono XIII estis sendube kvar „Internaciaj Sciencaj Kongresoj de Katolikoj”. La unua el ili okazis en Parizo en 1888, la dua — tie same en 1891, la tria — en Bruxelles en 1894 kaj la lasta en Svisuja Triburgo en 1897.

Mi ne havis feliĉon ĉeesti iun el ili, sed facile povas ilin al mi imagi. Vidaĵo estis vere neordinara. Kelkaj centoj de la plej gloraj reprezentantoj de l’ katolika scienco, kunvenintaj el la plej diversaj landoj, legantaj siajn diversfakajn sciencajn raportojn, komunikigantaj siajn eltrovojn aŭ pripensojn pri la plej diversaj sciencaj demandoj, partoprenantaj en amika scienca diskutado — jen okazintaĵo ne sole vidinda, sed ankaŭ je ĉiam memorinda kaj renoviginda. Ĉar jam per sia sola ĉeesto en la diritaj Kongresoj la katolikaj sciencistoj estis kvazaŭ ia viva apologio de l’ religio, montrante *fakte* al la senreligiuloj, ke la kredo ne estas esence kontraŭa al la scienco, ke tiuj du lumoj — de l’ homa saĝo kaj de Dia revelacio — tute ne estingigas unu la alian, sed kontraŭe povas harmanie unuiĝi en la animoj de l’ katolikaj sciencistoj, egale ŝatantaj la sciencon kaj la kredon.

Montri tiun-ĉi belan harmonion ne sole en la teorio, sed ankaŭ en la praktiko estis certe pli malproksima celo de la Int. Sc. Kongresoj de Katolikoj. La proksiman do kaj senperan ni trovas en la regularo de I. S. Kongresoj de Katolikoj, esprimitaj per jenaj vortoj: „I. S. K. de

Katolikoj havas la celon: eksciti kaj disvastigi la sciencan agadon de Katolikoj”<sup>1)</sup>

Ke la katolikaj scienculoj vere zorgis atingi tiun-ĉi celon, montras iliaj sciencaj laboroj dum kvar dirlitaj kongresoj. La sciencaj raportoj legitaj en la unua Int. Sc. Kongreso de Katolikoj en Parizo ekfaris *du* volumojn in-8 kun al-dono. Similaj raportoj de la dua aperis en *ok* volumoj in-8. La tria — riĉigis sciencan literaturon per *naŭ* novaj volumoj in-8. Fine la kvara almetis *dekunu* volumojn de tiu sama formato<sup>2)</sup>. El tio-ĉi ni vidas, ke la katolika scienca agado en tiu tempo iradis *crescendo*. Dum dek jaroj (1888—1898) la kvar katolikaj sciencaj kongresoj donis 30 volumoj da diversa scienca materialo. Por ke la legantoj ekvidu mem, ke tiu materialo ne estas malŝatinda, mi penos doni tie ĉi mallongan noticeton pri la sciencaj laboroj almenaŭ de la kvara. La alsenditaj al ĝi raportoj pro sia multeco kaj diverseco estis dismetitaj en dek sekcioj. La unu sekcio estis destinita al *sciencoj* religiaj<sup>3)</sup>. La plej interesaj raportoj estas de D-ro BOURDAIS: „L’histoire primitive”, de P-ro MÉMAIN: L’unification du calendrier chrétien”, de D-ro E. MUELLER: „Das Wunder und die Geschichtswissenschaft” k. a. La dua sekcio enhavas sciencojn ekzegezajn.<sup>4)</sup> El raportoj meritantaj la plej grandan atenton estas memorindaj de Th. CALMES: La question des Evangiles synoptiques”, de Th. SUCONA Y VALLÈS: „Le Déluge. Etude sur cet événement”, de R. P. LAGRANGE: „Les sources du Pentateuque”, k. a. La plej riĉa ol ĉiuj estis la tria sekcio, enhavanta sciencojn filozofiajn.<sup>5)</sup> Tie-

---

1) *Article premier.* — L’oeuvre des Congrès scientifiques internationaux des Catholiques a pour but de provoquer et de développer l’activité scientifiques des Catholiques. Cfr. *Règlement général de l’oeuvre des Congrès sc. int. des Catholiques.*

2) Cfr. Comtes rendus du Quatrième Congrès tenu à Tribourg en 1897 en 11 vol. in-8.

3) Comte rendu du Quatrième . . . Première section, Science religieuse, 434 p. in-8.

4) Tom. ren. du Quat. . . Deuxième section. Sciences Exégétiques, 356 p. in-8.

ĉi oni trovas multajn tre atentindajn raportojn, precipe de D-ro BACH: „Die Logik des Kindes”, DE LAURO CLARIANA RICART: „Sur la variabilité”, de MAT. MERCHICH: „Utrum in dialectica Aristotelea recte distinguuntur figurae modique syllogismi?”, de R. P. DE MUNNYNCK: „Notes sur l'atomisme et hylomorphisme”, FR. N. DEL PRADO: „De veritate fundamentali philosophiae christianae”, de MGR. DOTT. GIA VINATI: „Studio critico intorno al principio di causa” k. a. Plue iras sekcio kvara destinita al sciencoj juraj, ekonomiaj kaj sociaj<sup>6)</sup> (kun belaj raportoj de Kan. A. PILLET: „De la codification du droit canonique”, de M. BARTHÉLEMY TERRAT: „De la personnalité morale” k. a.), la kvina dediĉita al sciencoj historiaj<sup>7)</sup>, la sesa por sciencoj filologiaj<sup>8)</sup>, la sepa por sciencoj matematikaj, fizikaj kaj naturaj, la oka — por sciencoj biologiaj kaj medicinaj, la naŭa — por sciencaj aŭtropologiaj kaj la deka — por la kristana arto, arĥeologio, epigrafio. La dekunua volumo enhavas la priskribon de la kongreso mem, de ĝia regularo kaj la nomaron de personoj partoprenintaj en ĝi aŭ iel ajn ĝin helpintaj. Jen la tre interesa statistiko de la ĉeestintoj la kvaran: el Svisujo ĉeestis 277 personoj, el Germanujo 106, el Ameriko — 6, el Aŭstrujo — 13, el Belgujo — 15, el Hispanujo — 5, el Francujo — 183, el Anglujo kaj Irlandujo — 21, el Hungarujo — 4, el Italujo — 28, el Luksemburgo — 2, el Nederlando — 10, el Rumanujo — 1, el Rusujo — 7, el Turkujo — 1. Kune 679.

Tiu ĉi statistiko belege montras la veran internaciecon de la kvara.

Nemaŭpli klara estis ankaŭ ĝia katolikeco. Ĝin sufiĉe pravas la enhavo kaj karaktero de legitaj raportoj, precipe

<sup>5)</sup> Comte rendu du Quat. Troisième section. Sciences philosophiques, 719 p. in-8.

<sup>6)</sup> Com. ren. du Q. Quatrième Section. Sciences juridiques, économiques et sociales, 404 p. in-8.

<sup>7)</sup> Com. ren. du Q. Cinquième Section. Sciences historiques, 468 p. in-8.

<sup>8)</sup> Com. ren. du Q. Sixième Section. Sciences philologiques, 275 p. in-8.

en tri unuaj sekcioj. La maniero, kiel estis rigardata la kvara Int. Sc. Kongreso de Katolikoj en Vatikano, sufiĉe klare vidiĝas el la letero de Leono XIII al P-ro JOSEFO STURM, prezidanto de l' kongreso. Jen la teksto de tiu ĉi memorinda dokumento:

DILECTO FILIO JOSEPHO STURM  
in catholica Universitate Triburgensi Professori  
Ttriburgum Helvetiorum  
LEO P.P. XIII.

Dilecte Fili, salutem et Apostolicam benedictionem. —

Eruditorum catholicorum coetibus e regionibus univ-  
ersis per superiora tempora coactis commendationem Nos-  
tram libentes adhibuimus. Nam, praeter caetera quae inde  
derivabantur commoda, illud erat praecipuum ut pateret  
clarius, religionem humanae sapientiae progressibus non  
adversari, quin imo fidem cum scientiis amico foedere  
cohaerere. Quum igitur a te Nobis relatum sit proximum a  
catholicis scientiarum cultoribus conventum Triburgi Hel-  
vetiorum celebrandum, id equidem placuit eo praesertim,  
quod Triburgensis civitas et praeclare semper de religione  
sit merita et optimorum studiorum laude floreat, Nostris  
tum industriis tum benevolentiae cumulate respondens.  
Quod autem conventus disponendi munus suscipientes ex-  
ordium ab Apostolica benedictione ducendum duxeritis,  
hoc tuam sociorumque tuorum observantiam erga nos et  
Beati Petri Cathedram testatur. Quamobrem, omnia vobis  
habendoque coetui fausta ominantes, optatam benedictionem,  
coelestium etiam munerum auspiciem et paternae Nostrae  
caritatis pignus peramanter in Domino impertimus.

Datum Romae apud S. Petrum die III Aprilis anno  
MDCCCXCV, Pontificatus Nostri decimo octavo.

LEO P. P. XIII.

Bedaŭrinde post la jaro 1898 la Int. Sciencaj Kongresoj  
de Katolikoj plu ne estis kunvokataj. Kial? Sendube pro  
gravaj kaŭzoj. Ilin tie-ĉi priskribi kaj pridiskuti ne estas  
mia intenco. Mi povas montri nur unu tre gravan mal-

helpilon en la Kongresaj laboroj — ilian *multlingvecon*. Ĉar oficiale estis allasitaj en kongresaj raportoj ses diversaj lingvoj, nome: franca, germana, itala, angla, hispana kaj latina. Estas videble, ke la plej granda parto de kongresanoj posedis nur 2 — 3 el tiuj lingvoj, kaj tial multajn raportojn, eble eĉ la plej al ili interesajn, ne povis kompreni. Eĉ la pastroj mem, bone posedantaj lingvon latinan, pro la diversmaniera ĝia prononcado en diversaj landoj, apenaŭ povis unu alian kompreni.

Dank' al tio la diritaj Int. Scienc. Kongresoj de Katolikoj, belaj en sia ideo, ne povis vere kaj sukcese unuigi la diversnacion katolikan sciencistaron pro sia *diverslingveco*

Tiu-ĉi malsukceso de S. K. de K. hodiaŭ fariĝas facile superebla dank' al nia bela Esperanto. Niaj Unua kaj Dua bele ĝin elmontris en la praktiko. Tial laŭ la principo *aŭdaces fortuna juvat*, mi ekkuraĝas eldiri jenan proponon: *Katolika esperantistaro, ni ekpenu revivigi per Esperanto la belan ideon de Int. Scienc. Kongresoj de Katolikoj.*

Ĝin efektivigi oni povas, laŭ mia opinio, jene:

1. La Komitato por Nia Tria pripensu la suprediritan projekton ĉiuflanke.

2. Se trovas ĝin efektivigebla, ekpenu tiel organizi Nian Trian, ke ĝi povu konsisti almenaŭ el du sekcioj: *a)* el sekcio organiza kaj propaganda kaj *b)* el sekcio scienca.

3. Komence tiu scienca sekcio enhavu nur unu ian fakon, ekz. sciencojn matematikajn, fizikajn kaj naturajn.

5. Konsentinte principe enkonduki apartan sciencan sekcion en Nian Trian, la komitato rapidu per esperantaj gazetoj sciigi tiun-ĉi sian decidon, por ke la diverslandaj esperantistaj sciencistoj havu la tempon prepari konvenajn sciencajn raportojn por Nia Tria.

Laŭ mia opinio, tiu-ĉi pliigo de programo farus niajn Internaciajn Esperantistajn Katolikajn Kongresojn pli altir-emaj kaj pli fruktodonaj. Dank' al nia scienca sekcio, ni katolikaj esperantistoj altirus iom post iom la katolikan sciencistaron al Esperanto, kaj per ĝi ni sukcese revivigus la interrompitan tradicion de Int. Sc. Kongresoj de Katolikoj. Niaj kongresoj, estantaj ĝis nun *sole esperantaj*, fariĝ-

inte ankaŭ *sciencaj* akiros pli da aŭtoritato kaj alportus pli da utilo al ni mem kaj al la Eklezio Katolika. Jen estas la kaŭzo, pro kiu mi ekkuraĝis publike movigi tiun-ĉi demandon.

KOVNO. 23. I. 12.

P-ro. A. DOMBROVSKY.

**Noto de la Redakcio.** En Nederlando ekzistas la „*Asocio por por ekscito al praktikado de la scienco inter la Katolikoj de Nederlando*” (Prezidanto: Prof-ro D-ro C. H. H. SPRONCK, Prof-ro ĉe la Utreĥta Universitato; — Sekretario: Prof-ro Mr. A. A. H. STRUYCKEN, Prof-ro ĉe la Amsterdama Universitato). La celo de la Asocio klare vidiĝas el ĝia nomo. Ĝi estas pure *sciencia* Asocio, en kiu estas akceptataj kiel membroj nur Katolikoj kun universitata titolo aŭ katolikoj vere sciencistaj. Ĝi havas kvar sekciojn (la juristan; la kuracistan; la matematikan kaj fizikan; la literaturan sekciojn). Ĝi havas 400 membrojn. Ĉiujare okazas ĝenerala kongreso kaj kunvenoj de la sekcioj, en kiuj oni traktas pure sciencajn temojn.

La celo kaj agado de la Nederlanda sciencia Katolika Asocio estas do tute sama al la celo kaj agado de la kvar estintaj Intern. Sciencaj Kongresoj de Katolikoj. La unua estas nacia, la dua estis internacia; jen la sola diferenco.

Ĉu ekzistas en aliaj landoj tiaj, pure sciencaj, katolikaj naciaj asocioj? Niaj legantoj estas petataj baldaŭ respondi tiun demandon. Oni ne lasu la respondon al aliaj (ordinara kialo de neniu respondo), sed tuj respondu *mem*.

## „Kie estas la Eklezio de Kristo?”

Jen la titolo de verko, bone konata en Nederlando de katoliko kaj ne-katoliko, verko, de kiu aperos esperanta traduko je l' fino de tiu-ĉi monato. (Marto)

La tradukintino estas F-ino M. BORRET, sekretariino-kasistino de „Nia Dua”, kaj la eldonisto estas A. N. GOVERS en Hago (eldonisto de *Espero Katolika*). La verko ampleksos 59 §§ kaj ± 164 paĝojn kaj kostos proksimume 0.50 Sm.

Jam de longe tiu-ĉi traduko estis anoncita. Eĉ Pola



pastro SZUREK atentigis pri ĝi la legantojn de *E. K.* (Vidu *E. K.* Nov. 1911, p. 291-294). Pro la graveco de la enhavo la tradukintino zorgis, ke ŝia traduko estu travidata de lerta esperantisto, kaj Monsinjoro CALLIER, Episkopo de *Haarlem*, elektis esperantistan pastron por plej akurate ekzameni la esperantan tekston, por ke ĉiuj esprimoj je religia vidpunkto estu konformaj al la Nederlanda teksto; la verko aperos kun „Eklezia Aprobo”. Unu kaj alia malrapidigis la eldonon, sed kompanse la verko estos je lingva kaj religia vidpunkto plene fidinda kaj rimarkinda.

Despli rimarkinda, ĉar ĝia enhavo estas ora. Simplaj, klaraj, logikaj pensoj kaj pensaroj ĝuigas la spiriton de la plej simpla ĝis la plej instruita leganto. „La pura vero antaŭ ĉio” estas la sola devizo de la verkisto, la dolĉa kateneno, kiu katenas la legantojn al la libro kaj instigas al plua kaj ripeta legado.

Kiu miros, ke tiu-ĉi verko vidis en la malgranda Nederlando malofte multajn reeldonojn kaj milope estis legita de Nederland-lingvaj katolikoj kaj ne-katolikoj? Inter tiuj-ĉi lastaj *multaj* dankas konvertiĝon al la patrina Religio, *ĉiuj* liberigon de antaŭjuĝoj kaj pli bonan konon kaj do ŝaton de nia Religio kaj Eklezio: tiu-ĉi konstanta trafcelo por la venenigaj sagoj de mensogo kaj kalumnio, laŭ la demonia devizo de VOLTAIRE: „Mensogu, mensogadu; ĉiam la trafita vesto restos almenaŭ iom malpurigita de mensoga koto”.

La pia verkisto nu elfaldas la blankan veston repurigitan de la vera Eklezio de Kristo antaŭ niaj okuloj: kiel rava ĝi estas por ĉiu alrigardanto sincera, bonvola, bonintenca!

P-ro VAN DER HAGEN S. J. tutkore aplaudis la tradukon de sia multvalora verko. Kiel bedaŭrinde, ke li ne vidos la aperon de la traduko! Plaĉis al Dio doni al li la eternan rekompenson. Naskita 19 Aprilo 1847, li mortis „in Domino” 6 Februaro 1912 en Roterdamo. Li estis vere „pastor bonus”, kiu tutan sin donis al siaj ŝafoj, al siaj malriĉuloj, al la multaj laboroj, kiujn li entreprenis. Pro lia sankta vivo oni nomis lin dumvive: „la sanktuleton”. Ni preĝu por la perfekta ripozo de lia bela animo.

Sed per sia verko, kiu estas aperonta en Esperanta tra-

duko li komencos post sia morto bonfaradi tra la tuta mondo. Akceptu ni, katolikoj esperantistaj, lian verkon kiel sanktan kaj valoran heredaĵon. *Espero Katolika*, por honori lian memoraĵon, jen donas kelkajn paĝojn el ĝi, kun afabla permeso de la tradukintino.

(D-ro SMULDERS.)

---

## § 6.

### **Ĉu la vera Eklezio de Kristo estas videbla?**

La sekvonta renkonto donis al mi kaŭzon por ĉi-tiu demando.

Iun tagon mi vojaĝis fervoje al la urbo B. . . Mi jam sidigis min en 2a klasa vagono kaj la forvetursignalo jam estis donita, kiam dikega kunvojaĝanto rapide estis enpuŝata de unu el la kondukistoj. La viro sidigis sin kontraŭ mi; kaj, turninte la du pintojn de siaj lipharoj, li atente du aŭ tri fojojn rigardis mian personon, per rigardo kiu ŝajnis signifi, ke ne estis lia kulpo esti tiel proksime de Roma Katolika pastro. Nu, mi vere ankaŭ ne estis en kulpo; kaj kiel faras homoj, kiuj nur malofte vojaĝas, mi klopodis per simpla paroladeto pri la bela vetero, afabligi mian malafablan kontraŭnajbaron. Tio sukcesis sufiĉe bone; kaj jam ni estis amike babilantaj, kiam ni pasis lokon, kie estis starigita triumfarko en la apudeco de la stacidomo. „Ho”, ekkriis surprize mia kunvojaĝanto, „kion tio signifas?” „Ho,” mi respondis, „mi aŭdis, ke la episkopo „vizitis ĉi-tiun vilaĝon. Kio tie staras, verŝajne estas rest-„aĵo de triumfarko”. Tiu-ĉi simpla klarigo tamen trafis senteman lokon. Mia kunvojaĝanto komencis ege insulti tiun malsaĝan papanan idolservadon, tiujn supertiĉaĵojn kaj ŝajnigaĵojn de la Katolikoj. „Tiajn frenezaĵojn”, li fine diris, „mi nepre riproĉas. Tamen ne konkludu el tio, ke „mi estas nekredulo. Mi estas Kristano, tiel bone kiel iu „ajn. Mi servas la Mastron, Kriston en mia koro, mi kon-„fesas Lin kiel la Savinton, kaj celas vivi laŭ la intenco

„de la pura Evangelio. Kaj pro tio precize mi abomenas „tutkore la ŝajnigajn eksteraĵojn de Katolikoj”.

Mi lasis la bonan viron trankvile elparoladi, kaj poste demandis: „Ĉu la Katolika Eklezio, jam antaŭ la komenco „de l' Protestantismo pekadis per tiom da malsaĝaĵoj?” „Certe,” estis lia respondo, „eĉ pli terure tiutempe ol nun; „kaj tion vi scias tiel bone kiel mi”. — „Bone,” mi re- „prenis, sed kie do estis tiutempe la vera Eklezio de „Kristo? Aŭ ĉu ĝi ne ekzistis plu en tiuj tagoj?” — „Certe ĝi ekzistis, ne malpli bone ol ekzistas ĝi hodiaŭe; sed per „la vera Eklezio mi komprenas nenion alion ol la unuiĝon „de tiuj, kiuj posedas ankore la veran kredon en la Sin- „joro, Jesu Kristo. Tiu ĉi kredo nu estas tute interna, tiel „ke nek vi, nek mi, nek iu ajn, krom Dio sola, povas „vidi ĝin. La vera Eklezio de Kristo estas nevidebla; fren- „eze estas demandi, kie, kaj ĉe kiu ĝi precize troviĝas.”

Post tio la viro triumfe blovis fumnubon tra la vagono, kaj rigardis min, kvazaŭ volante demandi, kion do povus mi diri kontraŭe al tia motivigo. Kaj tamen, ho leganto, estis por kontraŭdiri tre multe.

Ĉar, unue Sankta Paŭlo aŭ pli vere, la Spirito Sankta mem alie pensas pri tio. Jen, kion la Apostolo skribas al la antikvaj Romanoj: Dirinte „Per koro oni kredas por „justiĝi,” li tuj aldonas: „sed per **buŝo konfeso** fariĝas „por feliĉiĝi.” (Rom. X, 10); t. e. ni devas konfesi **ekstere**, kion ni kredas interne. Kaj kion alian mia kunvojaĝanto mem ja faris? Li mem ja bezonis konfesi ekstere, kion li interne kredas.

Cetere, se la kredo devas esti ankore enfirmita, kaj se ne bezonas montri ĝin eksteren, mi demandas vin: kiel ni povas distingi kredulojn el nekreduloj? Kiel la kreduloj povas koni unu la alian, kiel ili konos siajn paŝtistojn aŭ religiajn superregantojn? Kiel povos ili interparoladi unu kun alia pri aĵoj rilate al la kredo aŭ al la religio?

Daŭre, ni scias ke Kristo instituciis diversajn Sakramen- tojn. Kiom da ili, mi nun ne volas ekzameni; sed supozu, sep. Tion do vera servisto de Dio nedube devas firmege kredi. Sed tiujn Sakramentojn Kristo instituciis ne nur por

esti kredataj, sed ankaŭ, kaj precipe, por esti aplikataj sur nin, kaj uzataj. Pro tio, eĉ se vi interne firmege kredus, ke ekzistas Bapto de Kristo instituciita, se vi tamen ne ricevus nek intencus ricevi tiun Bapton, la interna kredo sola nur tre malmulte helpus vin por eterna savo: Kiu kredos kaj **estos baptita**, tiu saviĝos". (Marc. XVI, 16.)

Plie, Kristo (kiel ni poste priparolos) diris al Sankta Petro, „Paŝtu miajn ŝafidojn, paŝtu miajn ŝafojn.” Nu, el tiuj vortoj Petro tutcerte komprenis, ke al li estis konfidita la zorgo pri la tuta ŝafaro, kaj ke li estis farita surtera Vikario de Kristo, kaj videbla Kapo de l' Eklezio. Ree, tiu kredo estis tute interna; sed ĉu ĝi ne devis sin montri ankaŭ eksteren? Ĉu eble Petro devis interne paŝti la ŝafidojn kaj la ŝafojn de Kristo? Aŭ pli bone, ĉu li kaj la aliaj Apostoloj kaj paŝtistoj ne devis predikadi la Kriston Krucumitan, apliki la Sakramentojn, rajtigi posteulojn, sin montri kaj konfesi sin publike kiel posteulojn de l' Dio-Homo? Sed ĉu tielaj faroj, kvankam ili estas internaj, ne estas ankaŭ nekontraŭdire eksteraj, eĉ necese ekstere videblaj? Ĉu vi do opinias, ke ni povas rajte nin nomi „lernanto de Jezu Kristo”, konfesante ni **nur interne** ke Li faris Sanktan Petron kaj liajn legitimajn posteulojn Superregantoj de l' Eklezio, kiun Li fondis? Ne vere; tiun internan kredon ni devas montri eksteren per servema submetiĝo kaj obeo, kaj precipe per vivado laŭ la leĝoj, kiujn Petro kaj liaj posteuloj surmetis sur nin.

Malrajte do estas diri, ke la Eklezio de Kristo estas nevidebla, tial ke la kredo, en si mem, estas io interna kaj nevidebla.

Kaj ne pli bone oni povas citi tie-ĉi la parolojn de Kristo, ke „la veraj adorantoj adoras la Patron en spirito „kaj vereco”. (Joan. IV, 23.) Ĉar:

1e. Iomete pripensante, ĉiu komprenos, ke tute ne estis la intenco de Kristo per tiuj vortoj absolute malpermesi ĉiun eksteran religiaĵon. Imagu foje, kara leganto, ke vi preĝas la „Patro Nia” respektive genufleksita, kun fermitaj okuloj kaj falditaj manoj, ĉu tiam pro tiu ekstera pieco, kiun vi montras, mi rajtus riproĉi vin, ke vi ne adoras la

Sinjonon en spirito kaj vereco? Mi kredas, ke vi ne mal-multe miriĝus pri tia riproĉo. Aaj tre prave vi povus citi la ekzemplon de Kristo mem, kiu, kiel la Evangelio klare diras, fleksigis la genuojn, dum Li preĝadis al Sia ĉiela Patro en la ĝardeno de l' Olivoj. (Luc. XXII, 41.) Ni do certe entute plenumos la deziron de Aristo, kondiĉe ke ni zorgas, ke nia pieco estu **ne nure** ekstera, sed ankaŭ sincere interna, vera kaj bonkora. Tamen:

2e. Se estas devo adori la Sinjonon en spirito kaj vereco, ĉu ankaŭ rezultas el tio, ke ni ne havas aliajn devojn por plenumi? Tute ne, ne vere? Se ni volas esti veraj sekvan-antoj de Aristo, tiam — kiel ni montris ĵus antaŭe — ni devas konfesi lian sanktan doktrinon ne nur interne, sed ankaŭ ekstere; tiam estas necese, ke ni ne nur interne respektu la legitiman aŭtoritaton de l' Eklezio, al kiu Kristo diris: „Aiu aŭdas vin, aŭdas Min; kiu vin forĵetas, Min forĵetas,” (Luc. X, 16.) sed ankaŭ, ke ni montru tiun respekton per submetiĝaj faroj; tiam estas devo ke ni uzu la Sanktajn Sakramentojn, t. e. iloj por sanktigi nin, kiujn Kristo postlasis al Sia Eklezio. Avankam do nia kredo kaj nia interna pieco estas ne-videblaj, la agoj kaj la faroj tamen de kredo kaj de religio, kiujn Aristo de ni postulas, necese estas videblaj por ĉiu ajn.

Resume, se Aristo fondis Sian Eklezion por gvidi nin kaj instrui pri la servado de Dio, kaj se la homo devas servi Dion ne nur interne kaj spiritmaniere, kiel la anĝeloj, puraj spiritoj, sed per **animo** kaj **korpo**, tial ke li homo estas, kaj se sekve li devas „glori Dion ankaŭ en sia korpo”, (I Cor. VI, 19-20) tiam necese rezultas, ke tiela Eklezio aŭ religio estas ne nure interna, sed ankaŭ ekstera aŭ videbla.

Cetere, ne estas eble nei, ke la Eklezio, kiel ĝi estas fondita de Aristo, posedas ĉiujn neprajn kondiĉojn de bone ordigita societo, t. e. de kuniĝo, kies membroj komune kunigitaj laboras kune por unu sama celo. Aristo ja ne volis, ke Liaj disciploj sole interne kredu Lian sanktan doktrinon, kaj ke cetere ĉiu iru nur sian vojon, tute ne depende unu de l' alia; sed Li deziris ke ekzistu ligilo

komuna, ordo, dependo unu de l' alia, kaj reciproka helpo kaj subteno. Kristo ja metis (kiel ni poste vidos) ĉiujn Siajn disciplojn sub la gvidon de legitima aŭtoritato, kiam Li diris al Petro: „Paŝtu miajn ŝafidojn, paŝtu miajn ŝafojn”. (Joan. XXI, 15, 17.) Ekzistos do legitimaj Superregantoj en la Eklezio, rajtigitaj por ordoni, kaj sekve ekzistos ankaŭ subuloj ligitaj por obei. Kelkaj havu ŝarĝon predikadi la Dian vorton, aliaj devu aŭdi ĝin kun lernema koro. (Ephes. IV, 11.) Kelkaj estu disdonantoj de la sanktigiloj aŭ Sakramentoj instituciitaj de Kristo, aliaj ricevu tiujn Sakramentojn el iliaj manoj. (I Cor. IV, 1.)

Vi do vidas, ke, laŭvole de Kristo, la disciploj de Lia Eklezio ne nur sekvas la saman celon, sed ke ili ankaŭ estas kune kunigitaj, tiel ke ĉiuj estas nur unu korpo kaj unu tuto, kaj ke ili, kiel la diversaj membroj de nia korpo, ankaŭ komune kunlaboras por atingi sian komunan celon. Kaj rezultas el tio ke la Eklezio, kiel ĝi estas fondita de Kristo, estas tre certe bone ordigita societo, kaj do ne malpli bone ol alia bonordigita societo aŭ unuiĝo, esence estas videbla.

Kaj kio rezultus se estus alie? Supozu foje, ke la vera religio estus ekskluzive kaj tute enfermita kaj kaŝita en ĉies koro, kaj ke la Eklezio de Kristo do estus nevidebla. Tiaokaze la paŝtisto havus ŝarĝon instrui al la disciploj de l' Eklezio la doktrinon de Kristo, igi ilin partopreni je la Sanktigiloj instituciitaj de Kristo, admoni kaj riproĉi ilin, eĉ elfermi ilin el la Societo, se ili estus obstinaj, (Matth. XVIII, 17.) kaj tamen ili ne havus iun signon por distingi, kiu ja aŭ ne apartenas al tiu ĉi Eklezio! Ĉu ni serioze povas certigi, ke Kristo, la senfina Saĝeco, fondis tian neeblan Eklezion?

Mi vere ne povus elpensi, pro kiu kialo Kristo komparis Sian Eklezion kun urbo sur monto, aŭ kun lumo sur kandelingo, kaj kiel Li povis ligi ĉiun aŭdi la voĉon de Sia Eklezio, se ĝi ne estus videbla kaj ekstere konebla.

Nekontraŭstare ni povas kaj devas nomi la Eklezion de Kristo iamaniere ne-vidibla. Tiokoncernante ni tie ĉi nur diras, ke povas esti homoj, kaj certe estas multaj, kiuj

senkulpe eraras pri la vera doktrino de Kristo, ne konas la legitiman de Kristo rajtigitan aŭtoritaton kaj sekve ne obeas ĝin, kaj neniam ricevas kelkajn de Kristo institucitajn Sakramentojn. Nu, se tiuj homoj, kiel ni supozas, tute nesciante pli bone eraras, kaj samtempe sincere servas Dion, ili sendube estas amikoj de Dio, kaj vere disciploj de l'Eklezio de Jesu. Tamen, tial ke ni ne povas, per iu ekstera signo, distingi tiajn homojn kiel membrojn de la vera Eklezio, kaŭze ke ili kompreneble ne faras ekstere, kion ordinaraj disciploj de l' Eklezio fari devas: pro tio ni, Katolikoj, kutimas diri, ke ili apartenas ne al la **Korpo**, sed al la **animo** de l' Eklezio: t. e. ne apartenas ili al la Eklezio kiel videbla por ni, sed kiel ne-videbla; alivorte, la vera Eklezio konsistas el ĉiuj, kiuj servas Dion laŭmezure de la lumo kiun ili ricevis.

---

## § 7.

### **Ĉu estas malfacile ekkoni kiu Eklezio estas la vera de Kristo?**

Ni ĵus elmontris, ke la vera Eklezio de Kristo estas videbla: sed tio kio estas videbla, pro tio tamen ne estas ĉiam facile distingebla el aliaj aĵoj similaj. Ekzemple mi havas veran diamanton inter dek aliaj brilantaj ŝtonoj. La vera diamanto nu certe estas videbla ne malpli bone ol la aliaj ŝtonoj. Bezonas tamen multe da lerteco por tuj distingi ĝin kun certeco.

Ĉu nu estas ankaŭ tiamaniere kun la unu, vera, de Kristo fondita Eklezio? Alivorte, ĉu estas malfacile eltrovi, kiu Eklezio, inter ĉiuj aliaj estas la vera de Kristo?

Ne malofte ni renkontas personojn, kiuj klopodas senkulpiĝi sian indiferentecon koncerne al religio per jena diraĵo: „Ho”, ili diras „estu vere, ke la homo estas ligata submeti sin al la Eklezio de Kristo, tio tamen nur malmulte nin helpos; ĉar ekzistas nuntempe tiom da Eklezioj kaj religioj, kaj ni ja ne povas decidi, kiu Eklezio estas la vera „de Kristo.”



Ĉu vere? Tiaokaze Kristo efektive estus farinta malsaĝe. Ĉar precize pro tio Li fondis Sian Eklezion, **por ke** Li montru al **ĉiuj** homoj la vojon en ĉielon. Kristo postulas, kiel ni jam vidis, ke ĉiuj homoj, ĉu bone- ĉu nebone-instruitaj, ĉu riĉuloj ĉu malriĉuloj, aŭdu la voĉon de Lia Eklezio, kaj ke ĉiuj kreu kaj respektu ĝian doktrinon kiel la Lian. Sed tion Kristo nerajtus postuli, se Li samtempe ne zorgus, ke ĉiu homo sufiĉe bone povu distingi la veran Eklezion el ĉiu alia ne-vera. Alie Kristo metus sur nin devon, kiun ni neeble povus plenumi. Li devigus nin, submeti nin mem al la aŭtoritato de Sia Eklezio, kvankam ni neblas ekkoni ĝin. Ĉu nu vi opinias, ke Kristo faris tian malsaĝon?

Do, se Kristo ordonas ĉiujn homojn, deve obei la voĉon de Sia Eklezio, estas ankaŭ necese, ke tiu Eklezio posedu kelke da karakterizaj proprecoj aŭ **koniloj**, per kiuj ĝi estas de ĉiuj homoj bonvolemaj **facile** kaj **certe** distingebla el ĉiu alia. Ĝi devas esti facile konebla. Ĉu ne Kristo klare tion aludis, kiam Li komparis Sian Eklezion kun urbo, kiu, konstruita sur **monto**, ne povas kaŝiĝi; kun lumo, kiu estas metita sur **kandelingo**, por lumigi al ĉiuj, kaj do facile esti videbla kaj distingebla de ĉiuj? (Matth. V, 14-15.)

Plie, per kiuj koniloj la vera Eklezio de Kristo estas ekkonebla? Jen sube:

---

## § 8.

**Kiuj estas la Koniloj, por distingi kun certeco la veran Eklezion de Kristo el la aliaj „Eklezioj?”.**

Precipe tiuj-ĉi kvar:

1e. La vera Eklezio de Kristo estas **unu**, t. e. staras ĝi sub unu videbla **Kapo**, kaj ĉiam kaj ĉie ĝi konfesas unu kaj la saman **Doktrinon**.

2e. La vera Eklezio de Kristo estas **sankta**, t. e. posedas ĝi **Doktrinon**, **Instituciojn** kaj **Sanktfarajn helpilojn**, kiuj vere sanktigas homojn; kaj tiu sankteco devas esti sigelita per **Mirakloj**.



3e. La vera Eklezio de Kristo estas **katolika**, t. e. universale disvastigita tra la tutmondo.

4e. La vera Eklezio de Kristo estas **apostolika**, t. e. kunigita pere de neinterrompita kaj legitima serio da paŝtistoj kun la unuaj paŝtistoj, la Apostoloj de Kristo.

Tiujn ĉi kvar punktojn ni mallonge disvolvos, kaj montrós ni, en kiu Eklezio troviĝas ĉiuj tiuj kvar koniloj de la vera Eklezio.

„Tradukis el nederlanda lingvo F-ino M. BORRET. (Hago)”

## Socialismo kaj Religio.

**Enkonduka artikolo en Lvova „Kronika Powszechna”.**

Kreinto de socialismo, Karlo MARX, nomis ĉiun religion ĝenerale „malsaĝa ideo de l' mondo, similanta al opio, dormiganta la homon”. Tiel same instruas ĝia plejfervora apostolo, Frideriko ENGELS. — BEBEL proklamis en germana parlamento: „ni forlasas ĉielon al anĝeloj kaj al paseroj, en estonta regno falos religio de si mem”. — LIEBKNECHT diris en tiu sama loko: „ni konfesas doktrinon de ateismo kaj ni konsideras kiel devon disvastigadi tiun-ĉi doktrinon inter grandaj amasoj; nia celo politika estas respubliko; ekonomia, socialismo; religia, ateismo”. — Eŭgenio DUPONT, sekretario de londona komitato, parolis dum kongreso de socialistoj en Bruselo (j. 1868): „for ĉiu registaro, ĉar registaro premadas nin per impostoj; „for ĉiu militistaro, ĉar militistaro kaptas nin je gorgo; „for ĉiu religio, ĉar religio estingadas inteligentojn”. — Komunard VARLIN kriadis dum kunveno en Pariso (j. 1870): „Dio estas fininta jam sian rolon; ni havas Lin jam tro „sufiĉe”. — En oficiala komentario de Erfurta programo, redaktita de du konitaj socialistoj, Karlo KAUTSKY kaj Bruno SCHÖNLONK, ni legas: „verdikto de morto kontraŭ religio estos anoncita kun momento, kiam ĝia historia bazo ĉesos ekzisti ”, (tio devas signifi, kiam socialismo venkos). — Jam en sia lulilo en unua internacia unuiĝo

(en la jaro 1864.) estis ruĝa ŝtandardo deklarita malamiko de religio ĝenerale, kaj de Katolika Eklezio speciale. Ĉie, kie socialismo sin prezentadis, kie ĝi oficiale alparoladis, dum kunvenoj, dum kongresoj, en parlamentoj, en broŝuroj, en gazetoj, ĉie ni aŭdis: for de ni Dio, for de ni religio!” — Eĉ plej novaj socialistoj, kiuj, kompreninte, ke eĉ la batalado por rebonigo de ekonomiaj kondiĉoj, eĉ la batalado por ekzisto, ne povas plenigi tutan homan vivon, kontentigi ĉiujn liajn revojn, decidiĝis al cedo por homa „sentimentalismo”, eligas religion el „regno de estonteco”. Ĝin devas anstataŭ ia „idealo de justeco”, ia sendependa moraleco, bazita sur la scienco. Ĉar „ĉiuj krimoj kaj ĉiuj pekoj estas senkulpigataj de banditoj en sutanoj”.

De kie venas ĉi tiu malamo de socialismo al religio kaj Eklezio, kie estas ĝia fonto kaj ĝiaj kaŭzoj?

Post francaj filozofoj de XVIII. jarcento, post enciklopediistoj, ripetadas socialistaj teoriistoj longe konatan kanton pri absoluta libereco de homo kaj malamas la religion, kiel laŭdiritan malamikon de ĉi tiu libereco. Kvazaŭ libereco absoluta, doktrina estus ebla! Nerezisteblaj naturleĝoj ĉirkaŭvolvas per miloj da katenoj la mortemulon, malhelpante facilecon de liaj movoj. Malsanoj, maljuneco, malpliigo de fortoj kun jaroj, limigiteco de intelekto, kiu ne etendiĝas post la limoj de senpera observado, fine malforteco de sentoj, haltigadas ekfluron de fantazio, de ekdeziroj kaj de avidoj homaj. La homo naskiĝas kaj mortas kiel sklavo de naturaj leĝoj, de kiuj absolutecon moderigas nur sola religio. — Religio estas pli kapabla psikologo ol filozofiaj kaj sociologiaj doktrinoj, ĝi scias plibone ol ili, kiel kvietigi vivdoloron, kiel interkonsentigi senfortecon de homo kun plifortaj naturleĝoj.

Parolas plue socialistaj teoriistoj: Eklezio estas malamiko al scienco. Dume oni scias, ke dum longa vivo de jarcentoj unika azilo de scienco, malsatata de kavaliraro, estis katolikaj monaĥejoj. Ĉio, kion kreis scienco ĝis la Renesanco, eliris el mallaŭtaj ĉeloj de monaĥoj. Estas vero, ke la scienco, transirinte en mondanajn manojn, ekfloris kun grandioza brilo, ke la dua duono de XVIII. kaj

la tuta XIX. centjaro ĉefe forrabis al naturo multajn ĝiajn sekretojn kaj plene utiligis ilin por homa profito, sed inter multnombra armeo de novtempaj scienculoj ne solaj mondanoj brilas per talento. Sur ĉiuj kampoj de scienco monaĥaj vestoj kaj pastraj sutanoj apudestas redingotojn de esploristoj kaj frakojn de mondaj sciencistoj. Scienco, sin okupanta per eltrovado kaj klarigado de tio, kio ekzistas, kion oni povas esplori per sentoj, ne malhelpas, nek malutilas al religio, kies regnon formas mondo, ekster ĉiu kontrolo de eksperimenta scienco. Scienco kaj religio povas ekzisti unu apud la alia, ili ne malhelpas sin reciproke. Fervojoj, telefonoj, elektro, progreso de medicino, ĥemio k. t. p. tute ne forigas necesecon de religio, kies celo estas ĉefe zorgo pri homa animo.

Fine asertas socialistaj teoriistoj: Eklezio estas malamiko al justeco! Laŭ ili la kristanismo anstataŭigis justecon per rezignacio kaj mizerikordo. „Kaj ni — ili diras — ne volas mizerikordon, ĉar almozo humiligas. Ni havas rajton esti io alia, ol almuzuloj. Ni postulas nur tion, al kio ni estas rajtigitaj, nian parton en divido el la sociaj havaĵoj. Rezignacio pro espero al rekompenco en alia mondo estas perdo, kompanse tro senmateria kaj mistika; ni deziras efektivajn plifaciligojn, plioportunajn kondiĉojn de vivo. Tio estas nia rajto; tion postulas la justeco”. — Eble neniu ekzistas, kiu rifuzas al laboristo rajton de tera rekompenco por lia honesta penado. Je tio-ĉi vidpunkto, ne povas esti du opinioj. Ne rifuzas do al li tiun-ĉi rajton iu ajn religio sur la mondo, kaj precipe ne la kristanismo, universale konata zorganto pri malriĉuloj kaj senheredituloj, kreinto de principo de proksimumo. Longan vivon de jarcentoj estis la Eklezio la ĉefa defendanto de malfortulo kontraŭ fortulo. Ĝi ja per potenca mano tenadis je bridoj brutalan egoismon de german-slavaj barbaroj, ĝi ja nobligis pasiemecon de kavaliraro, fariginte glavon obeema servanto de kredo kaj mizerikordo, ĝi ja estis rifuĝejo por ĉiuj premegituloj. Kiu ekstaris sur ĝia lando, kiu trapaŝis sojlon de ĝiaj monaĥejoj, fariĝadis ŝendanĝerita. Oni ja scias, ke eĉ liberuloj de mezocentjaroj,

maltrankviligitaj ĉiam de plipotencaj najbaroj, forkuradis sub protekton de abatoj kaj episkopoj, preferante sendanĝeran servuton ĉe servistoj de Eklezio ol liberecon, elmetitan senĉese al perfortoj de potencaj malkvietuloj. Sub pastoralo oni vivas oportune kaj agrable — oni diradis plejofte.

Nur la homoj malbonvolaj aŭ kiuj ne konas historion povas nomi Eklezion malamiko al justeco. Ĉiam ĝi staris kaj staras kiel gardanto por honesteco kaj justeco. Do al ĝiaj virtoj apartenas boneco, kiu estas neniam sekiĝanta fonto de justeco.

La socialistoj riproĉas al la Eklezio, ke ĝi anstataŭigis la justecon per mizerikordo kaj rezignacio. Ĝi ne anstataŭigis, ne forigis tiun-ĉi, sed ĝi plifortigis ĉi tiun, ĉar konante psikologion de l' homo pli bone ol socialistaĵ doktrinuloj, ĝi scias, ke la justeco ĝenerala, ekkonita, eksentita, kaj efektivigita de ĉiuj homoj, apartenas al neatingeblaj idealoj. Kiel helpanto de ĝenerala justeco la Eklezio plenumis verkojn, per kiaj neniu alia povas esti fiera. Ĝi estas ĉiam malavara por malriĉuloj, kion al ĝi eĉ ĝiaj malamikoj ne neas, ĝi fondadis lernejojn, hospitalojn, domojn por georfoj, por gemaljunuloj, por gekripluloj, ĝi faradis ĉion, kion ĝi nur povis, por forviŝi la larmojn ĉe malfeliĉuloj kaj mizeruloj. Ĝi ne povis esti malamiko de justeco, almenaŭ tial, ke tion ne permesas al ĝi animo de Kristanismo. La instruo de Kristo, enkorpigita en la vivo, estus plejefika, plejforta haltigilo al homa egoismo, pliefika, pliforta ol sangaj eksperimentoj de socialistoj.

Kulpigoj de ruĝstandarduloj kontraŭ religio, anoncitaj publike, ne povas rezisti al kritiko, ĉar religio neniam estis malamiko al libereco, scienco kaj justeco. Kaŭzoj de malamikeco de socialismo al religio kaj Eklezio oni devas serĉi tute alie:

Antaŭ ĉio la socialismo estas bazita sur la materialismo, kion ĝi cetere ne neas. Tion malkaŝe, laŭte konfesas ĉiuj ĝiaj teŝriistoj kaj kondukantoj. Ne estas do mirige, ke ili ne povas esti favore inklinaj al la religio ĝenerale, kaj al

la Kristanismo speciale. Ĉar la instruo de Kristo katenas pasiecojn, apetitojn, instinktojn de homo, lernigas al li malŝati materiajn nunajn celojn, starigante super ili la sopirojn de l' animo, ĝi montras kiel finan celon la vivon en aliaj mondoj. La *Religio-idealisto* ne povas plaĉi al la *socialismo-materialismo*, kiu kredas, ke la homa vivo ekzistas inter limoj de lulilo kaj ĉerko kaj kiu pensas direkti tutan energion de homo nur al ekakiro de plej granda sumo da nunaj, materiaj voluptoj.

Fine la religio staras kiel gardanto de fremda propraĵo kaj de fremda sano, ĝi instruas: ne ŝtelu, ne mortigu! — ĝi do katenas, kondamnas la sangan sendisciplinecon de socialista terorismo. Materialista mondvidpunkto de ruĝ-standardo kaj ĝia senindulga, sanga terorismo en batalo pri bonstato de proletariaro estas ĝusta kaŭzo de malamo de kolektivistaj utopioj al la religio, al la blanka anĝelo de homaro, kiu, anstataŭ instigi la homon al fratmortiga milito, metas kompatan, helpan manon sur ĉiujn dolorojn kaj maltrankvilojn de la homaro.

El pola lingvo esperantigis H. K. W. (Juĝa Sanatano).



**Je la pia Memoraĵo de S-ro Amatus Van Der Biest,  
Prezidinto de la Sepa Kongreso.**

„Benataj estas la mortintoj, kiuj en la Sinjoro mortis”,  
Apokalipso XIII, 14.

La tuta Esperantistaro suferas grandan perdon per la bedaŭrinda morto de S-ro VAN DER BIEST. La eks-prezidanto de la Belga Ligo, la ĉefa Organizanto kaj Prezidanto de la Sepa Internacia kongreso en Antverpeno estis vera Esperantisto. Lia tuta animo estis plena je la intima ideo de Esperantismo: la Frateco universala. Lia ago tute ne limiĝis al propagando de la internacia lingvo en sia propra lando, kvankam, je tiu vidpunkto, li tutkore kaj ageme

laboris. Ne, la agado de VAN DER BIEST estis internacia, tutmonda. Lia nomo estas konata kaj estimata en la tutmonda Esperantistaro. Pro tio lia morto certe kaŭzos grandan doloron en ĉiu lando, kie ekzistas samideanoj, kaj hodiaŭ, tio signifas en ĉiu civilizita lando.

Sed, se la esperantista familio perdis eminentulon, mi persone perdis karan, amatan amikon. Pro tio, mi petas la permeson diri kelkajn vortojn pri la intima karaktero de tiu bona, honesta, simpatia viro.

Kiel Prezidanto de la Belga Ligo Esperantista, li devis *publike* kaj *oficiale* sin montri absolute neŭtrala. Li estis la Prezidanto de la belgaj esperantistoj, ne konsiderante la diversajn opiniojn de ĝiaj membroj, kaj mi estas certa, ke ĉiu samideano belga atestos kun mi, ke li ĉiam uzadis tiun neŭtralecon lojale, kaj takte. Sed mi havas la plezuron esti lia amiko intima. Mi do povas certigi, ke *persono* li estis sincera Kristano kaj fidela Katoliko. Inter ni ekzistis perfekta unuiĝo de sentoj kaj de konvinkoj pri ĉiuj tiuj gravegaj temoj, vekitaj de la vortoj: Religio, devo, la vivo kaj la morto. Ofte ni parolis kune pri tiuj solenaj temoj kaj ĉiam ni konsentis inter ni. Kvankam lia situacio de Prezidanto malhelpis lin ageme partopreni en nia I.K.U.E., li tutkore aprobis la agadon de siaj Katolikaj samideanoj, kaj ĉiam, oportune, dediĉis kelkajn kuraĝigajn vortojn al la Katolika movado en „Belga Esperantisto”, kies Redaktoro li estis.

Neniam mi forgesos la amindan kaj karitplenan viziton, kiun li faris al mi dum mia danĝera malsano en la Katolika Hospitalo en Hago. Certe, unu el la plej ĝojaj tagoj de tiu neniam forgesebla monato, dum kiu ĉiuj el miaj amikoj volis, ŝajne, elmontri ĝis la fondo la bonecon de siaj Kristanaj koroj, estis tiu bela tago, kiam mia kara Amatus forveturis de Antverpeno ĝis Hago, por pasigi kelkajn horojn kun sia maljuna amiko.

Je la komenco de Januaro miavice mi pasigis unu Dimanĉon kun li. Nun *li* estis malsanulo, sed mi tute ne supozis, ke tiu interparolo devus esti la lasta inter mi kaj li. Dum tiu lasta vizito ni parolis tre intime, kaj estas pro

tio, ke mi ne dubas komenci tiun artikolon per la vortoj de la S-ta Skribo: „Benitaj estas la mortintoj, kiuj en la Sinjoro mortis”. Amatus VAN DER BIEST estis fidela kaj konvinkita Katoliko, kaj kiel la antikva roma soldato, kiam la estro alvokis lian nomon, li povis humile sed trankvile respondi „*adsum*”.

Estos agrabla sciigo por niaj tutmondaj membroj, ke li faris sian altaprobon al nia nova eldono de „*Espero Katolika*”, kaj ke li ankoraŭ esprimis sian indignon kontraŭ la malinda kondukaĉo de la „liberpensuloj” en Antverpeno dum la „Sepa”. Mi bone memoras liajn vortojn: „Kara amiko, ekzistas tie kaj tie-ĉi en la mondo homaĉoj, kiuj vivas en atmosfero de malamo kaj malestimo. Kompatu ilin, ni Kristanoj, kaj preĝu por ili”.

Kaj nun mi petas, mi petegas al la geesperantistoj de la tuta mondo, sed precipe al la Katolikoj, montri nian amon por nia kara kaj eminenta amiko katolikmaniere, t. e. preĝante por la sankta kaj perfekta ripozo de lia bela animo. Li ankoraŭ, ne dubu, ne forgesos nin. Estas por mi konsolanta penso, ke niaj samideanoj mortintaj „in Domino”, daŭrigas helpi nian Kristanan Esperantan movadon, kaj alproksimigas la alvenon de tiu benata tago, kiam ni formos ĉiuj nur „Unu ŝafaron sub unu Paŝtisto”.

Austin RICHARDSON.

---

## OFICIALAJ SCIIGOJ.

Respondante la multegajn demandojn, kiuj atingis min pri la adresaro de I. K. U. E., mi sciigas niajn gesamideanojn ke, konsiliĝinte kun nia kara Prezidanto kaj aliaj, la Komitato de I. K. U. E. decidis, forlasi sian unuan intencon, kiu celadis tuj eldoni adresarlibreton, sammaniere kiel U. E. A. eldonas membrolibron. — Ni opinias, ke pro diversaj gravaj motivoj, estas preferinde, publikigi la adresaron, pere de nia oficiala Organo E. K. antaŭ ol aŭ anstataŭ eldoni apartan libreton.

Utiligante nian E. K. por la publikigado de nia adresaro, ni unue agados laŭ deziro esprimita dum „Nia Dua”.



Due ni, tiel farante, esperas efiki, ke tiuj samideanoj kiuj ĝis nun ankoraŭ ne abonis nian oficialan organon, fine konvinkiĝos, ke ili fakte bezonas ĝin, se ili deziras justatempe konatiĝi kun la plej gravaj sciigoj pri la I. K. U. E. aferoj kaj Anoj.

Trie, ni eblas pli frue rekompensi tiujn samcelanojn, kiuj laŭdindege penadis kolekti ĉiujn sciindaĵojn rilate niajn diverslandajn samreligianojn.

Ĉar la Belga sekcio de I. K. U. E. honoriĝas havi intersiaj eminentaj membroj, la estimatan Prezidanton de I. K. U. E., ni kredas agi laŭdeve, se ni unualoke publikigas la Belgan membroliston, kiu, per la zorgoj de nia ĉiam laboremata Estro internacia, lia Pastra Moŝto A. RICHARDSON, fariĝis modela adresaro, imitinda de la alilandaj sekcioj.

Kompreneble nia meritplena Redaktoro de E. K. decidu pri la loko kaj maniero je kiu li presigos la adresaron. Mi estas certa, ke bonege kaj kontentige li prizorgos la aferon.

Fine mi atentigas la legantaron, ke mi publikigos ne nur la adresojn de la Katolika Esperantistaro, aliĝinta al I. K. U. E., sed ankaŭ iliajn oficiojn rilate I. K. U. E., alivorte: sciigante la nomojn kaj adresojn de nia anaro, mi intencas aldoni ĉu iu membro estas pastro (P); ĉu li prenas konfeson esperante, (P. K. E.); ĉu li estas helpisto (Help); t. e. ĉu li deklaris sin preta laŭpove helpi samreligianojn, kiuj petas lian helpon ekzemple dum vojaĝo al urbo, en kiu loĝas, aŭ kiun konas la „helpanto”, ĉu li korespondas esperante (Kor.).

Kompreneble I. K. U. E. intencas neniel devigi siajn anojn respondi al demandinto, kiu ne aldonis respond-kuponon. Mi speciale memorigas je tio, ĉar el ĉiuj korespondantoj, kiuj skribis al mi, nur *du* ne forgesis aldoni respondelspezojn.

Pri la I. K. U. E. regularo mi esperas komuniki kelkajn sciigojn en la sekvonta korespondado.

*Estimege via en K-o.,*  
FRANS KNAAPEN,  
*Sekr. ĝen. de I. K. U. E.*

TILBURG, Febr. 1912.



## Starigo de Anonima Akcia Societo, nomita: Internacia eldoniga Societo „ESPERO KATOLIKA”.

Ni rememorigas al niaj legantoj pri la artikolo en la Februara numero de *E. K.* pri la Akcia Societo starigota. Ni petas partoprenontojn *kiel eble plej baldaŭ* sciigi nin pri sia partopreno. La mono (f 60.50 po akcio) devos esti sendita *antaŭ* la 1-a de Aprilo 1912. Ni atentigas la legantojn, ke la valoro de ĉiu akcio estas *f 60.50 nederlandajn florenojn* (proksimume 50 Sm.). Por informoj sin turni al subskribanto.

La Regularo de la Akcia Societo estas jam definitive starigita, sed ne ankoraŭ presita. Tuj post ĝia apero ni sendos ĝin al partoprenantoj k. t. p.

Ĝis la 25-a de Februaro sekvantaj personoj sciigis nin pri partopreno:

P-ro Austin RICHARDSON, Bruselo . . . . .	unu akcio
S-ro HÖFELER (Ĉefeĉ), Londono . . . . .	unu „
F-ino M. LARROCHE, Paris . . . . .	10 „
F-ino de GOLLEVILLE, Montauban . . . . .	6 „
S-ro Cl. COLAS, Paris . . . . .	6 „
S-ro TURQUET, notario en Laval. . . . .	unu „
S-ro H. B. VAN ZWET, Utrecht . . . . .	unu „
F-ino Ida HORNUNG, Augsburg . . . . .	unu „
P-ro Patrick Parker, Wexford. . . . .	2 „
S-ro Frans KNAAPEN, Tilburg . . . . .	unu „
	D-ro SMULDERS.

## Kroniko de I. K. U. E.

### III-a Internacia Kongreso de Katolikoj Esperantistaj en Budapest. (Hungarujo.)

*I-a Cirkulero.* (Epitomo el la protokolo de loka komitato.)

Laŭ decido de l' II-a estas aranĝota nia III-a Kongreso en Budapest, en la bela ĉefurbo de miljaron vivanta lando, *Hungarujo*. Monsinjoro Dr. A. GIESSWEIN, parlamentano, kiu invitis la III-an en Hungarujon, jam preparis bone la sorton de nia kongreso. Li havas komision ne nur de l'

II-a, sed ankaŭ de *Hungarlanda Katolika Grandkunsido* por aranĝi nian III-an. Li ekkomencis sian laboradon en tiu direkto, ke la societoj de hungarlandaj katolikoj, ĉiuj proprigu nian movadon. Kaj efektive, jam la III-an aranĝos la „*Hungarlanda Katolika Federacio*”, kiu klopodos fondi esperantistajn sekciojn en ĉiuj unuiĝoj de katolikoj.

La loka kongreskomitato fondiĝis kaj ekkomencis sian laboradon. Decidis la tempon de III-a. La loka komitato trovis plej konvenajn tagojn por la tria, je 22—23-a de aŭgusto, post la tagoj de VIII-a. La kongresa karto kostos Sm: 2 = 4.80 Kronojn. La adreso de organiza komitato estas: „**Országos Katholikus Szövetség**” (Hungarlanda Katolika Federacio) *Budapest IV., Ferenciektere 7.* Kiuj intencas partopreni en la III-a Kongreso, ili sendu ĝeneralan poŝtkarton al la citata adreso, por antaŭanonco. Skribaĵon (nomon, profesion, adreson) legeblan ni petegas.

#### **La organiza loka komitato.**

(Represita el „*Hungara Studento*”, Febr. 1912.)

---

**Noto de la Redakcio.** — Ni iom miris, ricevinte la 1-an de Marto la *Hungara Studento*, en kiu troviĝas la Unua Cirkulero pri Nia Tria Kongreso de I. K. U. E. La oficiala organo de I. K. U. E. ricevis ĝisnun *neniun oficialan cirkuleron*. Do, kvankam ni tuj klopodis presigi la artikolon de la *H. S.* ankoraŭ en la Marta numero de *Espero Katolika*, ni ne povas doni garantion al niaj legantoj pri la ĝusteco de la sciigoj de supra cirkulero. Laŭ ĝi la katolika kongreso daŭrus nur *du* tagojn, kio estas neverŝajne, ĉar Nia Unua kaj Nia Dua ĉiu daŭris kvar ĝis kvin tagojn.

---

#### **Kardinalo van Rossum Esperantistiĝis.**

P-ro DECOENE, la konata redemptoristo-misiisto en Kanado, sciigis al P-ro RICHARDSON, ke Lia Eminenco Kardinalo VAN ROSSUM, Konsultoro de la S. Ofico en Romo (L. E. estas Redemptoristo kaj naskiĝis en Nederlando) alte aprobas Esperanton kaj eĉ estas membro de la Belga Katolika Esperantista Ligo. L. E. skribis laŭvorte al P-ro DECOENE: „L'Espéranto du Dr. ZAMENHOF rendra de grands services à l'église”. (La Esperanto de D-ro ZAMENHOF estos tre profitiga al la Eklezio).

## „Katolika Stelo” de Sabadell — (Barcelono-Hispanujo).

La pasintan 10-an de Decembro tiu societo festis sian unujaran datrevenon per tre interesa kunveno, en kiu partoprenis famekonataj kunlaborantoj en nia katolik-esperanta movado.

Ĝi ja ne estis nur propaganda poresperanta festo, sed ĉefe estis grava festo propaganda peresperanta de niaj katolikaj idealoj, precipe en la social-agado. Preskaŭ tuta la programo estis plenumita de tiaj temoj.

„Esperanto kaj la katolikaj Sindikatoj” estis la temo sur kiu disertaciis S-ro I. BOADA, kaj per kiu li priskribas la sindikatagadon nuntempan, ĝian necesecon kaj utilecon kaj fine kiel per Esperanto estas atingebla tiu celo de la Sindikatoj: starigi Internacian Katolikan Sindikaton.

„La nuntempa edukado de la virinoj; kio ĝi estas kaj kio ĝi devos esti laŭ la misio, kiun Dio al ili komisiis” estas pritraktaĵo de S-ino MARIA BOSCH. Ŝi raportas pri tiu ammisio, kiun Dio komisiis al la virinoj. Ili devas esti pacaj steloj en la familio. Prave eraras tiuj kiuj instruigas al la virinoj ne-necesajn aferojn, ofte eĉ embarasigajn aferojn, tiel kiel ludi la pianon, dancojn k. t. pl. La edukado de virinoj devas celi igi virinojn utilaj, kapablaj por alporti tiun pacon en la familio.

„Esperanto kaj la katolik-agado” jen afero, kiun pritraktis nova kaj fervora samideano D-ro JOSEFO RULL, paroĥestro en Sabadell. Certe nia kataluna esperantistaro trovos entuziasman kunlaboranton en tiu nova samideano, se ni juĝos laŭ la entuziasmo de lia unua parolado. Li resume diris, ke la agado estas necesa en la Katolika Eklezio, kaj rimarkis, ke tiu agado estos certe efika, se ĝi estus internacia, tutmonda, kion oni akiros facile, dank’ al la helpo de Esperanto.

Fine mi mem parolis pri la temo: „Esperanto kaj la Katolika Apologio”. Mi resume raportis pri la laboroj apologiaj faritaj kaj farotaj de nia I. K. U. E.. kaj detale priskribis la agadon de nia kunbatalanto P-ro DOWLING. Mi parolis ankaŭ pri la utileco, ke ni ĉiuj uzu Esperanton por helpi nian Eklezion, ĉefe nuntempe en nia lando, en kiu la malamikoj de Romo laboras senĉese por detrui, pereigi, la religion el nia popolo.

Ankaŭ kelkaj samideanoj legis poeziojn kaj ludis muzikaĵojn. La Festo finiĝis per ludado de komedieto de nia senĉesa laboranto S-ro FORNIELLA.

Mi nur devas aldoni ke la ĉeestantaro esti grandnombra, kaj laŭ la verŝajna opinio de kelkaj ĉeestantoj, neniam oni vidis tiel grand-

nombran ĉeestantaron en la esperantistoj festoj, kio pruvas ja, ke ne nur Esperanto kreskas ĉe ni, sed ankaŭ kreskas ĉiutage nia katolik-movado.

*La delegito,*  
D-ro JOAKIMO COLL.

---

### Katolika Societo Berlin.

La katolikaj gesamideanoj de Berlin fondis la 22-an de Januaro 1912 „Katolikan Societon Berlin”. Ĝia celo estas unuparte perespe-  
rante agadi por la internaciaj katolikaj interesoj laŭ la senco de I. K. U. E., aliparte flegadi kaj diskonigadi la esperanto-lingvon inter la katolikaro de la germana ĉefurbo. La societo aliĝos al I. K. U. E. La 1-an de februaro ĝi havis 18 membrojn. Korespondaj-  
ĵojn oni bonvolu adresi al: S-ro FROMM, Charlottenburg, Schulstr. 14 (Germanujo).

---

## KATOLIKA VIVO ĈIULANDA.

### La 23-a Internacia EŬKARISTIA KONGRESO. PROVIZORA PROGRAMO.

Por la grava manifestado de katolika kredo, kiu laŭ pli frua nia raporto havos lokon en *Wien* (Aŭstrio) de la 12-a ĝis la 15-a de Septembro, la prepara Komitato ellaboris jam *provizoran programon*, kiu enhavas jenajn ĉefajn punktojn:

La prezidanto de la konstanta komitato por la internaciaj Eŭkaristiaj Kongresoj, Mons. HEYLON, episkopo en *Namur*, malfermos la kongreson je la 11-a de Septembro en la katedralo de *S-a Stefano* kaj salute akceptos la *specialan delegiton-kardinalon de l' Sankta Patro*, kiu alvenos jam je la 10-a de Septembro en *Wien*, gvidata tien de kelke da komitatanoj de post la landlimo, kaj procesie, solene estos kondukata en la katedralon dum tiu sama tago.

Je la 11-a vespere estos *solena Diservo* en la katedralo.

Je la 12-a matene estos *meso kun komunioj en ĉiuj preĝejoj* de la ĉefurbo kaj antaŭtagmeze *episkopa meso* en la katedralo. Post tii kaj posttagmeze *sekciaj kunvenoj* havos lokon en la katedralo. Vespere je la 5-a la *dua festa kunsido* havos tie lokon.

Dum la 13-a kaj la antaŭtagmezo de la 14-a *sama tagordo* estas preparata. Tagmeze je la 14-a la *ferma kunsido* de la kongreso okazos.

Je la 15-a antaŭtagmeze la *granda eŭkaristia procesio* traŭros la urbon sur la belega Ringstrato ĝis la grandega placo antaŭ la imperiestra palaco. Tid estas limigita kontraŭ la strato per alta masiva konstruaĵo en formo de pordego kaj *sur tiu pordego en pompa tendo la kardinalo-ĉefepiskopo de Wien, D-ro Francisko X. Nagl diros festan meson, kiun ĉeestos ĉiuj anoj de la imperiestra familio kaj la tuta procesianaro. La imperiestro Francisko Jozefo I-a kun sia familio kaj la episkopoj partoprenantaj en la kongreso havos siajn lokojn sur la supra plataĵo de la pordego ĉirkaŭ la tendo por la kardinalo.*

La katedralo de *S-ta Stefano* interne kaj ekstere estos riĉe ornamita. Se ĝia grandioza interno ne estos sufiĉe granda por la ĉefaj kunvenoj, en du proksimaj preĝejoj *paralelaj kunsidoj* havos lokon. *Pli ol dudek-kvar diversaj kunvenoj* kaj por *dek-tri nacioj* estas preparataj.

*Ses specialaj sekcioj de sinjorinoj* agadas jam, estrataj de ses *arĥidukinoj*. Oni aranĝas *propagandajn paroladojn* en la ĉefurbo kaj en la provincoj, por informi la Aŭstrian katolikaron pri la signifo kaj la graveco de la kongreso.

Ankaŭ la *episkopoj el Hungarujo* kaj la *armeo* partoprenos en la kongreso, kiu, laŭ tiuj-ĉi preparoj sendube estos ne malpli impresiga kaj impona ol la pli fruaj.

*Ĉiuj demandoj* pri la kongreso estu direktataj al la *Centra Oficejo de Eŭkaristia Kongreso, Wien, I. Stefansplatz 5*, ankaŭ per Esperanto. *Fidindajn informojn al Esperantistoj* sendas *S-ro Joh. SCHRÖDER, L. K., redaktoro, Wien. VII. Kaiserstrasse 10*

*Venu, ni adoru!*

(Oficiale komunikita.)

### **Tutmonda Katolika Pedagogia Unuiĝo.**

(Pastro H. MADLENER, en Nürnberg (Bavarujo) sendis al ni jenan sciigon:)

„Al la unuiĝoj, kiuj aniĝis al la nomita tutmonda unuiĝo, kaj al ĉiuj, kiuj rigardas la kristanan edukadon de la junularo kiel rimedon, por renovigi ĉion en Kristo, jen oni sciigas, ke la kongreso por kristana edukado estas fiksita definitive al la mezo de Septembro 1912. Ĝi okazos ĵus antaŭ la same en Wien (Vienno) tiutempe okazonta eŭkaristia kongreso. Lia reĝa kaj imperiestra moŝto, la tronheredanto Francisko Ferdinando, akceptis la protektocon por la kongreso kaj Lia Eminenco kardinalo MERCIER (ankaŭ favoranto de nia I. K. U. E.), la eminenta belga pedagogo,

sciigis sian partoprenon. La treege konata seminar-direktoro, D-ro GIESE, helpos la entreprenon ne nur per sia kunlaborado, sed ankaŭ metante je dispono nombron da litoj kaj ĉambroj.

„En la kongreso oni unue pritraktos la edukadlaboron rilate la homan vivlaboron kaj difinos la celon de la edukado, kiu konsistas en la instruado de la moralaj kaj intelektaj bonoj al la idaro kaj en la anigado de la junularo al la socialaj asocioj.

„Plue, oni klarigos kontraŭ la multaj temp-eraroj la rilatojn de la pedagogio kaj didaktiko al la religio kaj difinos la esencon kaj signifon de la natura moralo. Same oni pridiskutos tempdemandojn, ekzemple la infan-psikologion, la eksperimentan esploradmanieron, la individuecon de la virina edukado rilate al naturo, historio, kaj revelacio dia, la unuecon de la edukado kaj de la instruistaro laŭ kristana kompreno de metio. La komitato serĉos por ĉiuj raportoj rekonatajn aŭtoritatulojn.

„Kiel fina termino por alsendado de skribaj raportoj pri la nomitaj temoj estas fiksita la 1-a de majo 1912. Ili devas esti verkitaj en germana, franca aŭ angla lingvoj, kaj estos presitaj kun la raportoj kongresaj.

„Aliĝojn akceptos la oficejo (ankaŭ L. Auer, jun, Donauwoerth, Bavarujo).

„En apartaj kunsidoj oni priparolos fundamentajn demandojn pri la plua disvastigado de la tutmond-unuiĝo. Ĉiuj aliĝintaj unuiĝoj bonvolu sendi riprezentantojn.”

Rimarko: Supra artikolo alvoka estas esperantigita el „Die christliche Schule”, (la kristana lernejo) (redaktoro prof-ro d-ro G. Wohl-muth en Eichstaett, Bavarujo) kaj ĝi klare montras la vigecon de la vivo katolika internacia. Kiam tiaj unuiĝoj komprenos la utilon de Esperanto por sia celo?

Bonvolu ĉiu ano de nia amata I. K. U. E., diskonigi ĉi supran alvokon en tiaj rondoj. La cirkonstanco, ke nia alta favoranto, Lia Eminenco Kardinalo MERCIER partoprenos, eble plifaciligos ilian laboron!

---

## Bibliografio.

**Fabiola**, rakonto pri la Katakomboj, de Kardinalo Wiseman, tradukis E. Ramo. Bela, zorge ilustrita volumo da 427 paĝoj en 8-a. Prezo Sm. 1.40 (fr. 3.50) (Universala Esperantia Librejo, 10 Rue de la Bourse. Genève).

Kiam, antaŭ jam kvindeksep jaroj la fama arĥiepiskopo de West-

minster Kardinalo WISEMAN publikigis sian gravan verkon „*Fabiola*”, ĝi tuj ricevis grandan sukceson ne nur ĉe la Katolikoj, sed ĉe ĉiuj amantoj de vere literaturaj verkoj, kaj de tiu tempo ĝis nun la verko konservis sian tutan valoron.

Saman sukceson sendube ricevos ĉe la internacia gelegantaro la lerta traduko de Ramo.

Ni ne povas ĉi tie resumi la rakonton, kiu estas interesa je duobla vidpunkto: tiom pro historia elvoko de primitiva Eklezio, kiom pro la psikologia studo de evoluo de sentema animo al la Vero. La aŭtoro majstre revivigas antaŭ ni la vivmanieron kaj la morojn de Roma societo dum la kvara jarcento ĉe paganoj kaj kristanoj. La ĉapitroj dediĉitaj al priskribo de la Katakomboj estas nepre rimarkindaj kaj interesplenaj: oni bone sentas ke la aŭtoro, dum li estis estro de la Angla Kolegio en Romo, perfekte konis la priskribitajn lokojn kaj eĉ ĉeestis la elfosadojn.

Meze de paganoj, inter kiuj miksiĝas kelkaj kristanoj, vivas *Fabiola* malestimanta la Kristan doktrinon, kiun ŝi konsideras nur kiel ridindan superstiĉon, sed kiun ŝi ne konas. Iom post iom ŝi nevole konatiĝas kun la instruoj de Kristo, precipe dank’ al interparoladoj kun sia fidela orienta sklavino kaj al la ekzemploj de belaj noblaj karakteroj, kiujn ŝi admiras kaj ŝatas, nesciante, ke ili trovas sian fundamenton en la religio de Kristo.

La lerta tradukistino mirinde sukcesis konservi la viglecon de l’ originala stilo uzante nur plej puran Esperantan lingvon. Kiam oni rememorigas, ke Ramo donacis al Esperanta literaturo „En Svislando”, „Dankon”, „Kredo kaj scio” k. t. p. oni ne bezonas plu insisti pri la korekteco de la Esperanta teksto, nek pri la talento de la tradukistino. Ŝi meritas ĉian laŭdon, tial ke ŝi riĉigis nian literaturon per bone elektita verko rimarkinde tradukita.

La samideanoj, eĉ tiuj, kiuj konas nacian eldonon de *Fabiola* plezure legos la Esperantan tradukon: ĝi estas taŭga pruvo pri la fleksebleco de la lingvo, kaj la verko mem estas tre rekomendinda ankaŭ al nekatolikoj.

Ni esperas, ke tiu mallonga skizo sufiĉos por instigi niajn samideanojn al legado kaj diskonigo de *Fabiola*.

Ili tion ne bedaŭros.

D-ro RAYM. VAN MELCKEBEKE.

---

*A. Niemojewski — Legendoj, kun permeso de la aŭtoro el pola lingvo tradukis Br. Kuhl. Internacia Mondliteraturo No. 2/3 1911. Magdeburg Kaiser Friedrichstr. 1.*

Estas nerekomendinda libro. Kiel amantoj la historian verecon



ni malaprobas tiajn mensogojn; kiel katolikoj ni abomenas energie tiajn insultaĵojn de la plej benindaj personoj de nia sankta religio. Tiela libro estas malpermesita legaĵo. Estu la traduko korekta, estu la aŭtoro multvalorega poeto, ni protestegas kontraŭ tiu-ĉi eldonaĵo.

NIEMOJEWSKI estas rekte nomata „unu el la ĉefoj de la polaj liberpensuloj.”

Uden, Nederl. H. LINNEBANK.

---

*Kolekto de Danubo. Krestomatio por infanoj kaj komencantoj, Verkita en kunlaborado de diverslandaj esperantistoj sub redak-tado de Romano Frenkel. Kajero unua. Bucuresti, Editura „Esperanto” 5, Str. I. C. Bratianu, 5. Prezo: 0.50 fr. (0.20 Sm.)*

Interesaj infanaj fabeloj kaj enigmoj. La pecoj estas tiel aranĝitaj, ke legintoj povos facile posterakonti kaj interdiskuti esperante la materion. La ideo de l'aŭtoro estas, enverŝi en sian Krestomation, „la riĉaĵojn de l' infana literaturo de la tuta mondo kun la plej pitoreskaj kaj diversaj stiloj.” Ĉiu samideano estas petata kunhelpi.

L.

---

*Krakow. — Illustrita Gvidlibro tra Krakow kaj ĉirkaŭaĵo. Eldono de Societo „Esperanto” en Krakow.*

Bela gvideto tra la urbo de La Oka. Ĝi instruas pri la historio de tre nobela pola urbo. Rondirante la stratojn, ĝi admirigas halojn, turojn, monumentojn fieregajn. Ĉiuj ajn dezireblaj informoj pri hoteloj, veturiloj k. t. p. estas prezentataj tie-ĉi.

Kiam do, ni petas, (respekte ni petas) ni ricevos tian gvidon de Buda-Pesth, la Kongresejo de nia tria Katolika?

L.

---